

# ESPERANTO

## ★ TRIUMFONTA ★

N-ro 22, 6. Marto 1921

Jurnalo internacia, universala, sendependa  
eldonata de Teo Jung, Köln-Horrem (Germ.)

\* Eliras semajne. \*

## XIII<sup>a</sup> Universala Kongreso de Esperanto

(31. Julio — 6. Augusto 1921 en Praha).

### Praha; Kongres-Urbo de la Dektria.

En kiu ajn jahrtempo vizitata, ĉiam mirigos vin tiu ĉi antikva restadejo de reĝoj, nun ĉefurbo de la Ĉeĥoslovaka Respubliko, per sia majesta beleco, kaj ĉiam restigos en vi agrablajn rememorojn. Grandvaloraj trezoroj de la arkitekturo kaj de la arto donas al la urbo nekalkuleblan valoron kaj envicigas ĝin inter la plej famajn centrojn arkeologiajn. La mezepoko, renesanco kaj la XVII-a jarcento amasigis sur ĝia teritorio, kiu terasmaniere levigas super la fluo de Vltava, sur la pentrindaj deklivoj de la urbaj montetoj, siajn publikajn konstruaĵojn, religiajn kaj burĝajn (entute 70 preĝejoj kaj pli multe ol 100 palacoj) kaj kreis el ili tiel ĉarman kaj mirigan kompozicion de surprizaj perspektivoj kaj pitoreskaj siluetoj, ke Praha prave povas esti nomata viva muzeo de l' arkitekturo.

Sed oni povas rigardi ĝin ankaŭ kiel muzeon de l' arta industrio, kiu precipe en tiu ĉi urbo, restadejo de centraj ŝtataj oficoj, komerca centro, koro de la tuta respubliko, sceno de la grandioza historio de Bohemujo — ofte




Ponto de Karolo IV-a kun la Katedralo (dekstre).

eĉ de la historio eŭropa — povis evolui en plena riĉeco. Multaj lokoj — konservitaj ĝis nun senŝanĝaj — pruvas silente, kiomfoje Praha estis la loko de gravaj historiaj okazintaĵoj, kaj centjaraj ŝtonaj atestantoj rakontas impresojn pri la mondfamaj konfliktoj religiaj.

Ne estas mirige, ke la urbo de tiel antikva gloro distingiĝas per surpriza riĉeco de muzeaj kolektoj kaj galerioj, kiuj prezentas al la vizitanto neatenditan ĝuon kaj al la sciencisto altvaloran materialon.

Sed malgraŭ sia antikva karaktero Praha tute ne estas mumio de malnovaj arkitekturoj, urbo sen vigla aktiveco kaj intensa vivo. Favora, eĉ unika geografia situacio inter montetoj kovritaj per luksa vegetaĵo, sur la bordoj de la larĝa, ŝpirebla rivero, sana atmosfero, oportuna internaciaj komunikoj perataj per direktaj rapidvagonaroj, tio ĉio formis laŭgan bazon por grandlinia moderna vivo de la urbo konstante kaj rapide kreskanta.

Nature ankaŭ la spirita vivo troviĝas sur alta grado en la urbo, posedanta du kompletajn universitatojn, du altajn lernejojn politeknikajn, aka-



Panoramo de la Kastelo „Hradčany“ kaj de la „Malgranda“ Kvartalo. Maldekstre la mezepoka (1348) Ponto de Karolo IV-a trans la riveron Vltava.


demon de sciencoj kaj tutan serion de aliaj sciencaj societoj. Ĝi estas entute la centro de lernejaroj en ĉiuj direktoj riĉe evoluinta.

Praha estas ankaŭ viva centro de vigla po-granda komerco kaj grand-industrio, kiu ekokupis la ĉirkaŭaĵon de la urbo, enhavanta nun kun antaŭ-urboj preskaŭ unu milionon da loĝantoj. Dufoje okazas en Praha konata foiro.

Densa fervojaro de elektra tramvojo interligas la ĉirkaŭon kaj apartajn kvartalojn de la urbo kun ĝia centro kaj ĉefaj stratoj, kie krom la urbaj oficoj kaj grandaj entreprenoj komercaj fondiĝis grandaj bankoj kaj ĉiuspecaj financaj institutoj prezentantaj al fremdulo ĉiujn utilojn de internaciaj interrilatoj sur la mona foiro.

La beleco kaj agrablaj de Praha, ĝia algrada saneco (laŭ la statistiko, Praha okupas la sesan lokon inter la plej sanaj eŭropaj urboj) subtenata ne malmulte per la akvokondukilo konstruita en 1912 kaj kondukanta bonegan, trinkeblan akvon el malproksima monta regiono, la rivero kun belaj, verdaj insuloj, vivigata somere eĉ vintre per oftaj festoj kaj diversaj sportaj entreprenoj, tio ĉio kune kun ceteraj, pli frue menciitaj superecoj kaŭzas en fremdlando intereson ĉiujare kreskantan por tiu ĉi urbo portanta prave la atributon „centofura“. Interesaj ekskursoj en la belan, arbarplenan ĉirkaŭaĵon de Praha, ebligataj per vaporsipoj sur Vltava kaj lokaj fervojoj, faras la viziton de la urbo tiom pli dezirinda.

La kreskanta nombro da fremdaj turistoj trovas por sia dispono unuarangajn hotelojn kaj restoraciojn kapablajn kontentigi ĉiujn dezirojn de gastoj.



Landa Muzeo.

Dum varmaj somervesperoj, kiam la vespera kanto de sennombraj sonoriloj formortas kaj la horizonto dronas en la lastaj rebriiloj de subiranta suno, al niaj okuloj prezentigas ĉarmaj aspektoj de majesta kaj poezieplena panoramo, kiuj elvokas impresojn neforgeblajn.

### Dektria Universala Kongreso de Esperanto.

(31. julio ĝis 6. aŭg. 1921 en Praha.)

#### Sesa Komunikoj.

**Fakaj Kunvenoj.** — Por *filatelistoj*, organizas s-ro Fleischer; *teosofanoj*, s-ro Cimr; *ŝakludantoj*, s-ro Hajek, kiu aranĝos ankaŭ vetludon de Esp. ŝakistoj.


**Kotizajo.** — Vidu la V-an komunikon!

**Deponado de mono en Praha.** — Vidu la IV-an komunikon!

**Vojaĝ-aferoj.** — Vidu la IV-an komunikon!

**Garantia Fundo.** — 1. s-ro Cech el Wien 100 Kč., 2. d-ro Robin, Warszawa 100 Kč., 3. s-ro Heek, Hengelo 500 hfl. — Garantii precipe esperantistoj el landoj kun bona valuto!

**Donacoj.** — Ĉeĥoslovaka Ministerio por Eksterlandaj Aferoj 5000 Kč., s-ro Heek el Hengelo 60 hfl., s-ino Mammen el Grenaa kaj ŝiaj 10 lernantoj-skoltaj 100 Kč., s-ro Straka, Bratislava 100 Kč., prof. Krouzil kun



Pulva Turo kun la Domo de la Repraentantoj, kie okazos la solena malferma kunsido de la XIII-a Kongreso de Esperanto.

kolegoj kaj studentoj, Brno 60 Kč., Anonima Societo „Centra Esp. Librejo“ en s Gravenhage 51 Kč., s-ro Ribas de Pina 5 liroj.

**Sciigoj pri loĝado kaj vivkostoj en Praha** aperos en la VII-a komunikoj.

**Kongresa Kaso.** — La financa sekcio aranĝis la 6. dec. 1920 amuzvesperon de Sankta Nikolao kaj du teatrajn prezentadojn la 19. nov. 1920 kaj la 26. jan. 1921, per kiuj entreprenoj la kaso pliriĝis je 7000 Kč.

**Aliĝoj.** — 102. F-ino Bridel el Blois; 105. s-ro Cimr el Praha; 104. s-ro Pregel, 105. s-ino Derengowska, 106. s-ro Derengowski el Bydgoszcz; 107. s-ro Andersson el Malmö; 108. s-ro Badura el Karvin; 109. s-ro Cech el Wien; 110. s-ro Karpati el Košice; 111. s-ro Rado el Budapeŝt; 112. d-ro Wicke el Chemnitz-Gablonz; 115. s-ro Mascaro el Palma de Mallorca; 114. s-ro Thiebault el Carignan; 115. d-ro Robin el Warszawa; 116. f-ino Hollert el Rotterdam; 117. s-ro Straka el Strašnice; 118. s-ro Kubala; 119. s-ino Kubalova;

120. f-ino Kubalova el Sleszka Os-  
trava; 121. s-ro Kamaryt el Bratis-  
lava; 122. s-ro Ribas de Pina, 123.  
s-ino Mercedes Vives O'Rell el Hu-  
esca; 124. s-ino Pokorny, 125. f-ino  
Heybal el D.-Gabel; 127. s-ro Alessio  
el Padova; 128. s-ro Sappl el Graz;  
129. d-ro Theilhaber, 130. s-ino Theil-  
haber el München; 131. s-ro Gren-  
kamp-Kornfeld el Jaslo.

Adreso por nur prikongresaj ko-  
respondadoj kaj oficialaj aliĝoj: s-ro  
Augustin Pitlik, Praha III, Nerudova  
40-III. p. (Aldonu respond-kuponon  
aŭ poŝtelspezon en naciaj poŝtmarkoj!)

Loka Kongresa Komitato.

### Alvoko al Esp. Kuracistoj.

Kolegoj, venu grandare al la Dek-  
tria en Praha! Ni aranĝos specialan  
kuracistan kunvenon. Ni zorgos pri  
sciencaj paroladoj. Sed precipe ni  
volas preparoli la revivigon de TEKA,  
kiu dum la milito ĉesis funkciadi, kaj  
novan internacian medicinan revuon,  
kiu povus fariĝi organo de nia  
asocio. Post la kongreso ni intencas  
aranĝi ekskurson al germanbohemiaj  
mondkonataj banejoj Karlsbad, Joachimsthal, Ma-  
rienbad kaj Franzensbad. Ju pli multnombra kun-  
venos la kuracistaro, des pli granda estos nia  
sukseso. Aliĝu ĝustatempe!

D-ro W. Robin, Varsovio, Marszalkowska 115.  
D-ro Adolf Bischitzky, Prago, Mikulavska 12.

### Sciencistoj en la XIII-a Kongreso.

Estas bezone, ke la sciencistoj-esperantistoj  
havu post longa tempo denove okazon pridiskuti  
gravajn temojn, kiuj interesas esperantismom egle  
grave kiel la sciencan. La 13. kongreso estos  
okazo por tio. Oni certe bone scias, ke la sciencia  
progreso ne efektiviĝas dum sciencistaj kunvenoj  
sed oni egale certe scias, ke oni multon profitas  
aŭskultante saĝajn raportojn pri la akiritaj sukcesoj  
kaj meditante dum la diskutado, kio nun estas  
farota kaj atingota. Tre grava, ĝojiga kaj instru-  
ema ĝuo estas en la dumkongresa kunveno aŭskulti  
raportojn pri la ĝis nun atingitaj rezultatoj en la  
esperanta faka sciencia terminologio, kiujn prelegos  
fakuloj de koncernaj sciencoj. Mi organizos tiajn  
raportojn laŭ ĉiuj sciencoj kaj petas sinjorojn  
kolegojn pri afabla sciigo, pri kia sciencia termino-  
logio ili estus pretaj raportoj (mi mem faros raportojn  
pri la hemio). La raportoj eldonitaj poste en libro  
estos certe instrua lingva verko de Esperanto.

Ĉiujn koncernajn proponojn bonvolu afable  
sendi (kun respondkuponon aŭ neuzitaj poŝtmarkoj)  
al

Dr. Stan. Kamaryt,

profesoro de reallernejo en Bratislava,  
Tělocvičná 3. Ĉeĥoslovakio.

### Al ĉiulandaj ĝeinstruistoj.

Estante aranĝantino de faka kunveno peda-  
gogia ĉe la XIII-a Universala Kongreso Esperan-  
tista en Praha, mi petas ĉiulandajn ĝeinstruistojn  
pri afablaj proponoj rilate tiun ĉi laboron.

Ĉion sendu (kun respondkuponon aŭ neuzitaj  
poŝtmarkoj) al

Julie Šupichová,

faka instruistino en Praha II-2032, Ĉeĥoslovakio.

## Antau-Kongreso 1921.

La urbo de la „Kvara“, Dresden, aranĝos  
Internacian Antau-Kongreson kaj invitas kore la  
vizitantojn de la Praga Kongreso.

### Provizora Programo:

28. julio antaŭtagmeze vizito al la vidindaĵoj de  
la urbo,

tagmeze komuna tagmanĝo en la „Granda  
Gardeno“,

vespere publika propagando kunveno, poste  
ev. vizito de koncerto.

29. julio antaŭtagmeze veturado per speciala ŝipo  
sur Elbe al Pillnitz kaj migrado, vespere granda  
festo kun balo internacia.

30. julio komuna veturado al Prago per — se  
eble — speciala vagonaro.

La kongres-kotizaĵo estas ankoraŭ komunika.

Per afabla helpo de la porfremdula asocio kaj  
de la polica kaj poŝtista Esp. grupoj estas ĉio  
bone organizata.


Venu multnombro, ni promesas agrablan rest-  
adon! Anoncu tuj per poŝtkarto vian partoprenon,  
ni poste sendos al vi ĉiujn niajn informilojn.

La kongresa komitato.

Adresu ĉion al nia oficejo Dresden-N, Haupt-  
strasse 38.

## Internacia Turista Kunveno en Italujo.

La XIII-a Kongreso en Praha okazos de 31. julio  
ĝis 6. aŭgusto; tuj poste (7.—8. aŭg.) oni organizos  
ekskurson al proksimaj bohemiaj banlokoj. La  
11.—12. aŭg. okazos la VI-a Kongreso de Italaj  
Esperantistoj en Trento, al kiu la kongresanoj de  
Praha estas kore invitataj. La 13. aŭg. oni veturos  
al Rovereto, vespere oni ĝuos kolosan spektaklon




Parlamentejo.

en la antikva roma „Arena“ de Verona. La 14.—15.  
oni kuntroviĝos en Milano kaj oni formos kara-  
nenon laŭ la nombro de la partoprenantaj turistoj  
ĉu por viziti la urbon ĉu por komenci la rond-  
veturadon tra Italujo laŭ jena vojaĝplano (Thos.  
Cook & Filo, vojaĝ-agentoj, Milano, via Manzoni 7):  
Unua tago forveturo el Genova, dua tago al  
Pisa, tria tago al Roma, kvara ĝis sesa tagoj en  
Roma, sepa tago al Napoli, oka kaj naŭa tagoj  
ekskursoj al Vesuvo, Pompei, insulo Capri, deka  
tago veturo al Roma kaj Firenze, dekunua tago  
en Firenze, dekdua tago al Venezia, dektria tago  
en Venezia, dekkuara tago al Trieste, dekkuina  
tago forveturo el Trieste hejmen.

La prezoj por la tuta vojaĝo el Trento ĝis  
Trieste (15.—50. aŭg.) kaj por ĉiuj hotelaj servoj  
el Milano ĝis Trieste (16.—50. aŭg.) estas: Unua-  
klase en vagonaroj kaj en hoteloj 1920 lirojn,  
unuaklase en vagonaroj kaj duaklase en hoteloj  
1510 lirojn, duaklase en vagonaroj kaj duaklase  
en hoteloj 1285 lirojn.

La suprediritaj prezoj enhavas: la koston de  
la biletoj laŭ la vojaĝplano el Trento ĝis Trieste;  
la koston de la hotelaj servoj depon la forveturo  
el Milano ĝis la alveturo al Trieste; la koston de  
la veturiloj (omnibus) el la stacidomoj ĝis la hoteloj  
kaj viceversa; la koston de la maten-, tag- kaj  
vespermanĝoj depon la forveturo de Milano ĝis  
la alveturo al Trieste.

Sendu tuj adreson, aĝon kaj po du fotograf-  
aĵojn, por ricevi senpagan membrokarton, al F.  
E. L. Via Rossari, 2, Milano (Italujo).



### Nacia Operejo,

dekstre de kiu estas videbla la pinto de la  
insulo „Zofin“ (elpar. Jofin), kie troviĝos  
la Akceptejo kaj Kongresejo de la XIII-a.

### Aliaj Kongresoj.

26.—28. marto (pasko) jarkunveno de Sveda Esp.  
Federacio en Falun.

25.—28. marto (pasko) VII-a Kongreso de Esp.  
Asocio Finnlanda en Tampere. Adreso: Esko  
Boellus, Pinninkatu 30, Tampere.

9.—10. aprilo Printempa Kongreso de Reinlanda  
Vestfalia Esp. Ligo (Revelo) en Köln (Germ.).  
Adreso: Revela Oficejo, Köln, Hohestr. 26.

### 10-a Germana Esperanto-Kongreso en Essen (Pentekosto 1921).

Kiel ni aŭdas, la intertraktadoj kun la urba  
administracio en Essen pri la 10-a Germana  
Esperanto-Kongreso fine havis bonan rezulton,  
tiel ke la financa situacio de la kongreso estas  
certigita. Nun la vojo estas ebenigita kaj la  
preparoj funkcias pli facile ol ĝis nun.

Certe, la vizito al la kongreso estos mult-  
nombra. Ĉiu germana samideano, kiu ajn povos,  
volos ĉeesti la unuan kongreson post la milito,  
kiu nin disigis por tiel longa tempo. Kaj supoze-  
ble ankaŭ kelkaj eksterlandanoj profitos de la  
bona okazo rigardi per propraj okuloj tiun

regionon, kiu nun estas eble la plej  
interesa en la tuta mondo, kiu pro-  
duktas la nigran karbon, kaj tiun  
urbon, kiu atingis mondfamon per la  
grandiozaj fabrikoj de Krupp. La  
vivo en Essen ja ne estos multe-  
kosta por anoj de Jandoj kun bona  
valuto, kaj cetere la urbo situas tiel  
proksime al la fremdlandaj limoj, ke  
ĝi estas facile atingebla de la ekster-  
landanoj.

La kongres-kotizo estas 25 mk.  
(ĝis 15. aprilo 20 mk.). Ĉiuj komu-  
nikaĵoj koncernantaj la kongreson  
estas adresotaj al s-ro supera poŝt-  
sekr. Eugen Klein, Essen, Aldegrever-  
str. 13. Mensejoj al la poŝteka  
konto de la Esp. Grupo, Essen 10499.

Mendoj de ĉambroj kaj anoncoj  
por la komunaj manĝoj estas petataj  
kiel eble plej baldaŭ.

## Gazetaro.

STADT-ANZEIGER (Köln) de 24.  
febr. kaj ESSENER ALLGE-  
MEINE ZEITUNG de 23. febr.  
komunikas (laŭ Internacia Esp.  
Servo) la decidon de la Pariza

Komerca Ĉambro enkonduki Esperanton en la  
komercajn lernejojn de Parizo.

## Lernejo.

SVISIO. La registaro de la Ĝeneva Kantono  
enkondukis Esperanton en la unuagradaj lernejoj.  
Esperanto estas instruota kiel de viga Instrufako.  
Aliaj kantonaj espereble baldaŭ sekvos la ekzem-  
plon de Ĝenevo.

## Poŝto.

MÜNCHEN (Germ.). La 30. febr. okazis nova  
Esp. ekspozicio en salono disponigita de la Imperia  
poŝtministerio, sekcio VII. La du paroladoj de  
s-ro sup. poŝt-administr. Jacob kaj la ekspozicio  
rezultigis kursojn kun pli ol 500 gepoŝtistoj.  
Certe tre rimarkinda sukceso.

## Vera Esperantismo.

Sub la titolo „Esperantistoj por la malsantaj  
hungaraj infanoj!“\*) skribas la granda tagjurnalo  
AZ UJSAG en Budapeŝt sekvante:

Komence de la vintro skribis Evelinjo Julián  
korŝirigan priskribon pri la mizero de la budapeŝtaj  
infanoj. Pro tiu ĉi vea voĉo ekmoviĝis la koroj.  
Dum kelkaj semajnoj oni kunmetis ducentmil kronojn  
por helpi la mizeron de kvindek mil lernejanoj,  
kiun sumon ni transdonis al la Infanprotektanta  
Ligo por plibonigi la nutradon de malsanaj infanoj.  
(Pri la sanaj dumtempe zorgas la amerika help-  
komitato!) Kiam ni ĉi tion konstatas, ni devas  
aparte mencii tiun sindonan helpemon, per kiu la  
Hungara Esperanto Servo subtenis ĉi tiun homaman  
ateron! Ĝi publikigis la artikolon de Evelinjo  
Julián en la Esp. gazetoj, kaj baldaŭ venis la unuaj  
donacoj el la nordaj neutralaj ŝtatoj. Por esti  
fideaj al la vero ni devas konstati, ke 50% de  
la kunmetita sumo, do proksimume centmil kronoj,  
venis per la Hungara Esperanto Servo al ni. Ni  
ne komprenas la Esp. lingvon, sed tio estas certa,  
ke ĝi devas havi ian apartan sorĉan povon, se  
ĝi povis tiel sukcese akiri la korojn de ekster-  
landanoj por la hungaraj infanoj.

Ni kvitanças sube la plej lastajn donacojn  
ricevitajn pere de la Esperanto Servo (en hungaraj  
kronoj):

f-ino Nella Boon, 's Gravenhage . . . . .	1555.—
f-ino M. A. C. Schaafsma, Beverwijk . . . . .	1200.—
la sama . . . . .	1000.—
s-ro W. de Vries, Amsterdam . . . . .	2000.—
R. Broesterhuizen, Rijswijk . . . . .	1750.50
E. R. Blackett, Bath, Anglujo . . . . .	915.—
E. van Wolf, Haarlem . . . . .	2575.—
M. Weststeyn, Zwolle . . . . .	5076.92
J. W. Mann, Leeds a Esp. Grupo . . . . .	1015.—
John Bredall, Croydon . . . . .	5600.—
s-ino Ihr, s-ro Gebers, Deynoot, Haag . . . . .	550.—
F. W. Nanning, Scheveningen (aŭstr. kr. 15 000.—) . . . . .	14847.50

Oficistoj de Rotterdamsche Bankvereeni-  
ging, Bykantow, Kneuterdyk, Haag 24846.—

f-ino J. W. von Zwet, Haag . . . . .	1487.50
f-ino C. van Konijnenburg, Haag . . . . .	5000.—
f-ino Maria L. Gendeken, Haag . . . . .	500.—
C. G. Corporaal, Haag . . . . .	1350.—
J. Guerida, Central Comité voor Hongar- sche Kinderens, Haag . . . . .	1404.—
H. J. van Roo, Utrecht . . . . .	2000.—
E. de Wolf jr., Haarlem . . . . .	14546.15
sumo	84594.57

Koregan dankon al ĉiu helpanto! Jen vere  
praktika uzo de Esperanto! Sed ĝi devus esti  
same efika ne nur por bonfaraj celoj, sed por ĉia  
homa celo, ĉu komerca, industria, ĉu ŝtata, sciencia  
aŭ alia.

\*) Kiel rezultato de nia artikolo „50000 malsantaj infanoj  
en Budapeŝt“ ni publikigis ĉi tiun raporton. Ĉar la donacintoj  
ne ĉiuj povas ricevi la gazeton „Az Ujsag“, ni ĉi tie re-  
presas la kvitancojn de la lastaj mensejoj.

# Grava Avizo!

ET havebla en la stacia librejo de ĉiu pli grava loko!

Kiu ne konsentos, ke estus bonega reklamo, ne sole por ni sed ankaŭ por la Esperanta movado, se ni povus skribi ĉi supran avizon sur la titolo de nia ĵurnalo?

Imagu, ke ĉiu stacidoma libro-stakisto elpendigus ET je sia stando. Kiom da homoj aŭ indiferentiaj al nia movado ne estus frapataj per la granda titolo vorto „Esperanto“, ĉe ĉiu iom grava stacio denove, ĉiusemajne denove, ĉiam kaj konstante denove! Kiom da vidantoj, eĉ ne-esperantistoj — eble nur por kontentigi sian scivolemon — ne aĉetus ekzempleron? Ĉu tio ne estus la plej efika kaj samtempe plej malakra eĉ senpaga reklamo, ĉu ne la plej konvinka kvankam modesta signo de seriozeco de nia movado?

Kaj por la esperantisto certe estus granda kontentigo tiu konscio, ke ĉie, kien ajn li vojaĝos, kie ajn li restados, li povos aĉeti „sian“ esperantistan ĵurnalon, same kiel la franco, vojaĝante en fremda lando, povas aĉeti en ĉiu pli grava urbo sian „Matin“ aŭ „Temps“ aŭ „Petit Parisien“, aŭ la anglo sian „Times“, aŭ la germano sian „Berliner Tageblatt“ aŭ sian „Kölnische Zeitung“. Ĉu tio ne estus vere bela venko de Esperanto, ĉu tiam nia ĵurnalo, la nun „triumfOnia“, ne jam estus „triumfAnta“!

Vi certe jesos. Nu, en kelkaj lokoj oni jam komencis tion, vendigante nian ĵurnalon per stacidomaj aŭ urbaj kioskistoj, ŝajne kun bona sukceso. Ekzemple en Budapeŝto estas ope vendata ĉiusemajne 50 ekzempleroj, en Tallinn (Estonio) 20, en Tergul Mureŝ (Rumanio) 30, en Sibiu 10, en Bilbao (Hispanio) 20, ankaŭ en Köln-Kalk kaj Plauen (Germanio) oni aranĝis opojn vendadon.

Ĉu simila aranĝo ne estus ebla en ĉiu loko, kie ekzistas esperantistoj? Ni kredas, ke jes. Kaj por ebligi al la samideanoj en ĉiuj lokoj la senriskan enkondukon de la ope vendado, ni estas pretaj, liveri dufoje po 10—20 ekzempleroj de nia ĵurnalo tute senpage per la dirita celo. Poste — konstante kiam da ekzempleroj estas ope vendebaj — oni antaŭpagos tiom da ekzempleroj, kiom oni vendas po monato. Je ĵurnaloj sendotaj minimume kvinope al unu adreso kaj vendotaj ope per kioskistoj, ni donos rabaton de 30%. La nomoj de tiuj kioskistoj, kiuj tenos regule ET en sia stando, estos publikigitaj en ET.

Samideanoj, utiligu ĉiuloke tiun sukcespromesan proponon, kiu povas multe akceli nian movadon kaj je kiu vi havas nenium riskon; ĉar — ni ripetas — dufoje ni liveros la ĵurnalon po 10—20 ekzempleroj tute senpage!

Se oni multloke efektivegis nian projekton, ni per tio povos ankaŭ rapidigi la plialtigon de nia eldon-nombro, kiu finfine ebligas al ni pliampleksigi nian ĵurnalon ĝis 6, 8 aŭ eĉ pli da paĝoj po numero.

Do, faru senriskan provon!

## Niaj Abonantoj.

Je la lasta tago de februaro la nombro 900 de niaj pagantaj abonantoj estis transpaŝata. La abonantoj apartenas al sekvantaj landoj:

Germanio ĉ. 500, Hungario 100, Britio 60, Estonio, Polio kaj Rumanio po 40, Svedio 35, Hispanio, Aŭstrio kaj Litovio 30, Brazilio, Finnlando, Nederlando kaj Ĉeĥoslovakio 20, Usono kaj Argentino 15, Norvegio 12, Italio kaj Francio 11, Portugalio 10, Danzig kaj Bulgario 6, Svisio, Belgio kaj Japanio 4, Kubo, Kanado kaj Turkio 3, Islando 2, Jugoslavio 1.

Supren al la deka centoj!

## Internacio Katolika

KÖLN (Germanio). En tiu ĉi al ĉiuj katolikoj de la mondo bone konata urbo (la „germana Romo“), s-ro ĝenerala sekretario de la ĉefepiskopa ĝeneralsekretariejo, pastro Neufeld, sukcesis aranĝi kurson por 12 katolikaj pastroj kaj profesoroj. Grupo de lka estas fondota.

## Reklamo por Esperanto.

La finnaj administracioj de poŝto kaj fervojoj permesis al niaj samideanoj elmeti en ĉiuj poŝtkontoroj kaj en ĉiuj atendejoj de la stacidomaj reklamo-afiŝojn pri Esperanto.

Estas presitaj afiŝoj finnaj kaj svedaj per verda kaj nigra koloro sur blanka papero (30:50 cm) kun teksto:

„La internacia lingvo Esperanto estas nek utopio nek kimerio, sed moderna instrumento de la praktiko de internaciaj komunikadoj, facile lernebla, tuj uzebila. Por informoj kaj servoj sin turni al...“

Sekvas la adresoj de la Centra Oficejo de UEA, de Esp. Oficejo Finnlanda kaj de la plej proksime loĝanta delegito.

Oni dividis la landon en ĉ. 40 distriktoj, en kiuj oni penis havigi delegiton al UEA. Iliaj adresoj estas aparte presitaj kaj ĝuitaj sur la afiŝoj.

La 28. jan. oni kunvenis al gaja kunlabora festeto por la ekspedicio. La sekvintan matenon, antaŭ la plikarigo de la poŝta tarifo, oni sukcesis forsendi preskaŭ 1500 rulaĵojn.

## Muziko.

Vizito de angla horo „Romilly Boy's Chorus“ al Belgio (Pentekosto 1921).

La 12 febr. kunvenis komitato de ne-esperantistoj kaj esperantistoj en sidejo de Nacia Instituto de Militinvalidoj en Antverpeno por organizi la viziton de la „Romilly Boy's Chorus“ el Barry. La angla grupo konsistis el 34 knaboj kaj 10 gevioj (instruistoj kaj helpistoj); ĉiuj scivopas Esperanton. La infanoj volas kanti kaj violonludi kaj dediĉi la enspezojn al iu aŭ alia elandona bonfara movado. La knaba horo organizas ĉiujare vojaĝon eksterlanden. Ili jam vizitis Usonon, Kanadon, Francujon, en kies ĉefurbo ili 1912 obtenis I-an Grandan Premion en la Internacia Muzika Konkurso.

En Belgio la knaboj kantas popolajn kantojn kimirajn, anglajn k. a., ankaŭ Esp. kantojn.

La programo estos: 14. majo Ostende, 15. kaj 16. majo (Pentekosto) Liège, 17. Antverpeno, 18. Bruxelles, 19. Gent, 20. Brugge.

La diversaj grupoj zorgos, ke ĉiuj anglaj amikoj dormu senpage ĉe privataj personoj, se eble ĉe esperantistoj.

Sekretario de la organiza komitato estas s-ro Franz Schoofs, 45, Kleine Beerstraat, Antverpeno.

## Malgajiga Sciigo.

La delegito de UEA en Petrograd, A. Juhnvič, skribas la 6. febr. 1921 jene:

Nia societo pasintan ĵaŭdon, la 5-an de februaro, havis gravan malprofiton. Dum neniuj estis en la loĝejo, antaŭ la 7-a vespere, kiam ordinare kolektiĝas la esperantistoj, okazis incendio. Unu ĉambro, en kiu estis kancelario kaj vendotaj presaĵoj, tute forbrulis. Felice la fajro ne disvastiĝis tra la tuta loĝejo, ĉar baldaŭ post la komenco de la incendio venis deoranta samideano kaj, malfermite la loĝejon, rimarkis la fumon kaj fajron kaj tuj oni vokis la fajrobrigadon, kiu rapide estingis la fajron. La melbrulo de la ĉambro, tapetoj, planko, muroj kaj tuta presa materialo estas plene difektitaj. Oni savis la skribaĵojn. La apudaj ĉambroj: salono kaj biblioteko restis nedifektitaj. La sumo de la perdo ne estas ankoraŭ difinita.

## Tra la Mondo.

La konata nederlanda firmo „v. d. Eb en Dresselhuys“ Scheepvaart Maatschappij“, Rotterdam, donos al kelkaj el siaj ŝipoj nomon ĉerpitan el la internacia lingvo Esperanto, nome: Marglo, Marbirdo, Maristego, Maristo, Mamevo kaj Marrabo. Tiamaniere la sonoj de nia lingvo estos transportataj trans la oceanon en fremdajn landojn. Jen bona reklamo por nia afero!

La 1-an de marto la germana delegacio partoprenis unufoje la Londonan Konferencion. D-ro Simons konatiĝis la germanan kontraŭproponon, laŭ kiu Germanio pagu sumon de 50 miliardoj de oraj markoj. Germanio jam pagis 20 mil. per naturajoj kaj volas pagi la reston en 30 jaroj kondiĉe, ke estu aranĝota internacia financa konvencio en kvin jaroj. — Lloyd George deklaris, ke tiuj ĉi proponoj pravas plenan malkonon de la situacio, kaj se la germanaj dokumentoj ne enhavas aliajn proponojn, ili ne valoras ekzamenon kaj priskuton.

Ĉe kunpuŝigo de vagonaroj proksime de Chicago (Usono) estas 40 personoj mortigitaj kaj pli ol cent difektitaj.

## Internacia Esperanto-Servo.

(La traduko kaj la represo en naciaj ĵurnaloj kun aldonado de la vortoj „Internacia Esperanto-Servo“ estas permesata.)

### LETERO EL LITOVIO.

Kaunas, 21. febr. 1921.

La 16-an de februaro Litovio solene festis la trian datrevenon de sia sendependeco. Antaŭ tri jaroj, t. e. la 16-an de februaro 1918, tiama nacia reprezentantaro aŭ tiel nomata Ŝtata Konsilantaro (Valstybes Taryba) deklaris pri la renaskigo de Litovio kaj pri la interrompo de la kunligo kun Rusio, sub kies regado dum multaj jaroj ĝis la mondmilito mizere vivis litovia lando.

La saman 16-an de februaro Litovio agnoskis Litovio de jure. Pro tiu ĉi agnosko la litovia socio en nuna Litovio ĉefurbo Kaunas aranĝis por alveturintaj Latviaj delegitoj grandajn ovaciojn kaj montradis siajn simpatiojn al la latvoj.

Se la litovia socio nuntempe ne volas plu rigardi al diversaj proponoj de Polio, kiu dezirus aneksi Litovion aŭ almenaŭ interkonsenti kun ĝi pri milita aŭ alia konvencio (ĉar litovoj vidas en similaj kunligitaj la mizeron de Litovio), — sed kun aliaj baltaj ŝtatoj, t. e. kun Latvio, Estonio kaj Finnlando, litovoj deziras fari interligon aŭ tiel dirante la Ligon de Baltaj Ŝtatoj.

La demando pri la orienta parto de Litovio, precipe pri la disdikto de Vilnius (Vilna) ankoraŭ nuntempe estas tre aktuala. Sed lastatempe en tiu okupita parto de Litovio la aŭtoritato de pola generalo Zeligovski estas fatinta. Kunvoko de promesia Sejmo de tiel nomata „Meza Litovio“ estas prokrastita ĝis nedifinita tempo. Laŭ ricevitaj veraj sciigoj oni neniam kunvokos tiun ĉi Seimon, ĉar jam nuntempe regadas fakte en tiu regiono la registaro de Polio. Ĉar en la tuta regiono, okupita de poloj, preskaŭ ĉiutage kariĝas la vivrimedoj kaj malgrandiĝas la labor-enspezoj, tiaj

ĉiuloke la loĝantaro esprimas sian malkontentecon. Pro tio la nombro de simpatiantoj al la Litovio registaro laŭgrade kreskas. Pola valuto en Vilnius iom post iom falas, kaj nun por unu litovia marko\*) oni donas ĉirkaŭ 15 da polaj markoj.

Se estus solvita la demando pri la orienta parto de Litovio, la Litovio Sejmo (parlamento) kaj registaro pli rapide ordigus la internajn aferojn de la lando, kiel administradon, klerigadon ktp. Unu el tiuj tre gravaj problemoj de nia lando estas la terposeda reformo. Laŭ prilaborita projekto oni trakondokus la tutan terposedan reformon tiel, ke ĉiu granda bieno, kie ĝis nun estis dungataj laboristoj, estu parcelata kaj disdonata al senteruloj, kaj fine en la tuta lando estu aranĝataj apartaj memstaraj termastrumadaj bienetoj de tiu grandeco, ke unu homa familio povu senmizere vivi.

El aliaj ŝtataj aferoj en unua vico staras la demando pri la plimultigo de lernejoj aŭ ĝenerale de la klerigado de la loĝantaro. En tiu ĉi sfero oni bezonas multe da laboro, ĉar dum la mastrumado de la rusa registaro ĝis la mondmilito estis malpermesita la instruado per la gepatra litovia lingvo. Aliflanke, la rusa registaro eĉ ne permesis malfermi en litovia lando superajn lernejojn laŭ rusaj reguloj. Ekzistintaj mezaj lernejoj (gimnazioj) estis fonditaj per grandegaj penoj, do pri la fondo de universitato neniu povis esperi, ĉar ĉiujn pet-skribojn la rusa registaro malakceptadis.

Tial la popolklerco en Litovio ne povis sufiĉe grande plialtiĝi ĉe la rusa regado. Tamen malgraŭ tiaj malbonaj cirkonstancoj la grado de la popolklerco en Litovio estis pli alta ol en Rusio — pro tio, ke litovoj en multaj lokoj estis aranĝintaj sekretajn lernejojn, kie multaj niaj civitanoj ricevis la unuajn sciencajn sciigojn per sia gepatra lingvo.

La postsignoj de la rusa reĝimo ankoraŭ nuntempe estas sentataj; sed dum la lastaj du jaroj de sia sendependa ekzistado Litovio faris tiom grandajn paŝojn antaŭen, kiujn ĝi sub fremda regado neniel povus atingi dum kelkaj dekoj da jaroj. Pro la nesufiĉo de propraj superaj lernejoj, parto de la litovia junularo studas sciencojn en Germanio, Svisio, Ameriko kaj en universitatoj de aliaj landoj.

A. KLIMAS, Kaunas (Litovio)  
Redakcio „Lietuvos Ukininkas“.

\*) Unu litovia marko egalas al unu germana marko.

## Recenzejo.

### LIBROJ.

ZUR RECHTFERTIGUNG DES ESPERANTO gegenüber seinen Kritikern. Germanlingva broŝuro (15:22 cm, 52 pĝ. kaj kovrilo) defendanta Esperanton kontraŭ ĝiaj kritikantoj. Laŭ parolado de prof. d-ro Dietler, gvidanto de Saksa Esp. Instituto, farita la 27. nov. 1920 en la urba lerneja muzeo de Braunschweig je invito de la landa registaro de la respubliko Braunschweig. Samtempe defendo kontraŭ la lastatemaj atakoj kaŭzintaj per la dekretaj favoroj por Esperanto de la instru-ministerio de la ŝtato Hessen kaj Braunschweig. Havebla ĉe Germ. Esp. Librejo en Leipzig, Johannisplatz 5. Prezo 3 mk., 10 ekz. 25 mk., 100 ekz. 200 mk.

La manko de loko bedaŭrinde ne permesas al ni sufiĉe laŭdi tiun bonegan defendilon kontraŭ la malamiko de de nia movado; ĉiu propagandisto, ĉiu esperantisto, kiu povas veni en la situacion, ke li devas refuti kontraŭdirojn aŭ senfortigaj kritikoj je Esperanto, devas posedi la broŝuron. Ni ne lasu nin subigi de niaj kontraŭuloj; ĉiu kontraŭulo kontraŭ Esperanto estas refutbla. Ni studu la broŝuron elunde, kaj ni havos je nia dispono armilojn, per kiuj ni povas venki eĉ plej obstinajn nekredantojn. R-ano.

### GAZETOJ.

#### ESPERANTO. Febr.

Atentinda artikolo de E. Privat „Antaŭ Praha“... en ĉiuj aliaj movadoj... la samgrupoj speciale kotizas por sendi almenaŭ unu aŭ du delegitojn. Ni supozu grupon da 30 nerikaj personoj. Neniu povas elspezi 300 fk. necesajn, sed ĉiu povas donaci 10 fk. Unu jaron veturos tiu persono, alian jaron tiu alia ktp. Iom post iom ĉiuj plej agemaj grupoj estos ĉeslinitaj almenaŭ unu kongreson per reciproka subtenado. — Lastatempe kelkaj esperantistoj demandis sin, ĉu ni tro parolas aŭ ne pri la „internia ideo“. Ne tiom paroli estas utile, sed egi laŭ tiu Zamenhofa inspiro. Esperanta vivo tute ne bezonas esti kontraŭnacia. Plene sufiĉas, ke ĝi estu supernacia, alte tutmonda. ... La internia ideo ne estas dogmo, ĝi estas... atmosfero. Ni gardu ĝin.

GERMANA ESPERANTISTO. Febr. Jen denove bonega numero. Speciale interesas artikolo pri la Saksa Esp. Instituto. — Impresa priskribo de aŭtomobil-veturado tra la industria regiono. — Novaj grupoj de GEA en Chemnitz, Dresden, Eberswalde, Graz, Hamburg, Krefeld kaj Leoben.

## Grava Peto.

Dum la en Flensburg okazonta specimena foiro (komence de aprilo) la tiea grupo intencas propagandi por Esperanto, disdonante flugfoliojn kaj reklamojn; tial oni petas Esp. firmojn sendi tiajn. Je la foiro oni atendas viglan partoprenadon de komercistoj el Slesvig-Holstein kaj Danlando. Ĉion, precipe ankaŭ urbgvidilojn, gazetojn, afiŝojn ktp., kio taŭgas por ekspozicio oni sendu al Elise Jacobs, Flensburg (Germ.), Mathildenstr. 9.

## Atentigo.

La speciala eco de la hodiaŭa numero bedaŭrinde devigis nin, re interrompi la daŭrigon de la rakonto „La Senlingvulo“. Ankaŭ aliaj artikoloj, eĉ anoncoj, devis esti prokrastataj por la venonta numero. La nombro de niaj abonantoj ja ankoraŭ ne sufiĉas por regula preso de 6 paĝoj. Ankaŭ niaj teknikaj cirkonstancoj ne alllasas nuntempe la intencitan regulan Aldonon pri Literaturo, Scienco kaj Arto. Tamen ni klopodos, ke la venonta numero aŭ certe la pro 24 havos 6 paĝojn.

# Ju pli frue, des pli bone!!

Se vi intencas viziti la

## XIII<sup>an</sup> Universalan Kongreson de Esperanto,

ne prokrastu vian aliĝon ĝis la lastaj monatoj!  
Se vi ankoraŭ ne decidigis, decidigu tuj!  
Ju pli frue vi aliĝos, des pli bone estas.

Se en via grupo estas neniu, kiu povas partopreni, pro malriĉeco, kolektu de ĉiu ano malgrandan sumon, por ke vi povu kune sendi almenaŭ unu delegiton!

La Dektria Kongreso devas fariĝi grandioza sukceso por nia afero!

Sendu vian aliĝon al la ĝenerala sekretario

S-ro Aug. Pitlik, Nerudova 40, Praha III.

## Printempa Granda Foiro de Praha

Ĵus okazas (28. febr. ĝis 8. marto).

Informojn pri la Aŭtuno Foiro 1921 donas la

Foir-Oficejo (Esperanta Sekcio), Praha I  
Staromestská radnice.

## 4<sup>a</sup> Internacia Foiro de Frankfurt a. M.

\*\*\* Printempa foiro: 10.—16. aprilo 1921. \*\*\*

Ampleksa ekspozicio de 30 branĉoj.

Programo:

Importo kaj Eksporto.

Akcelado kaj rekonstruado de la internacia interŝanĝo de komercaĵoj.

Prospektoj en germana, angla, franca, itala, hispana, dana, norvega,

\*\*\* holanda, sveda lingvoj kaj Esperanto. \*\*\*

Korespondado en Esperanto!

Antaŭ-Katalogo kun plurlingva registro, Listo de la Komercaj Branĉoj en Esperanto.

Oni petu tuj presaĵojn aŭ detalajn informojn de

Messamt (Esperanto-fako) Frankfurt a. Main (Germanujo).

### Anoncetoj.

SENDI TUIJ vian adreson aŭ anoncon por 3-a eldono de „BES-a Adresaro de Esperantistoj“! Postulu senpagan prospektin! — Bohemia Esperanto-Servo, Moravany, Bohemio, Ĉeĥoslovakio.

ANGLA LINGVO. Anglaj ĝesamideoj! Kiu volas al mi helpi en la lernado de la angla lingvo, skribu al mi. Jozefo Major, Budapeŝt IX, Remete str. 56-11-4.

FOTOGRAF-ARTO. S-ro Otto Emmert, Berlin-Friedenau, Odenwaldstr. 25, L., deziras interŝanĝi fotografajn kaj leterojn pri fotograf-arto kun esperantistoj de ĉiuj landoj. Ĉiam tuj respondos.

INFORM-PETO. S-ino Adele Sommer, el Semlin (Zimuny), Hungarujo. Mi petegas kaj kore dankos ian informon pri tiu samideoj. Skribu al s-ro Paulino Santiago, del. UEA, Macao-Alagoas, Brazilio.

HUNGARA LITERATURO. Pro malaltiĝinta valuto hungara tre malkaraj Esp. libroj el hungara literaturo. Petu proponojn de Hungara Esp. Servo, Paŭlo Balkanyi, Hajos-utca 15-11-2, Budapeŝt VI.

### DEZIRAS KORESPONDI AŬ INTERŜANĜI:

Louis Berg, Berlin N. 39 (Germ.), Fennstr. 60/1., deziras korespondi per leteroj aŭ kartoj kaj interŝanĝi poŝtmarkojn kun ĉiulandaj samideoj.

Erich Glöck, Breslau 15 (Germ.), Goethestr. 67, deziras korespondi kun ĉiuj landoj per poŝtkartoj ilustr. kaj interŝanĝi poŝtmarkojn.

Lisbono (Portugalujo). David de Carvalho, Rua das Orlarias, 68-4-D-10, deziras korespondadon kun samideoj ĉiulandaj kaj anarkiuloj aŭ personoj, kiuj interŝanĝas pri la socia movado.

Familio Max Hofmann, Chemnitz (Germ.), Nordstr. 3 Eg. deziras korespondi per poŝtkartoj ilustritaj kun sepa-tagaj geadvencitoj de ĉiuj landoj.

F-ino Judith David, Düsseldorf (Germ.), Bilker Allee 166, I. etg., deziras korespondadon kun ĉiuj landoj.

Fritz Scharfenberg, Düsseldorf (Germ.), Benzenbergstr. 22, deziras korespondi per belaj artaj poŝtkartoj, ankaŭ kolektas ĉiuspecajn Esp. teatrajn kaj koncert-programojn; ĉiam respondos.

F-ino Elinjo Lampert, Budapeŝt IX, Örmövényg-str. 44a-1V-74, deziras korespondadon kun ĉiuj landoj. Tuj respondos.

Kiu sendos al mi 25—50 poŝtmarkojn de sia lando, ricevos same tiom da nuntempaj germanaj poŝtmarkoj. Karl Kueper, Düsseldorf 5 (Germ.), Graf, Adolf Str. 11.

Varsovio, Polio, str. Złota 31, s-ro Konstanty Chmielewski, deziras interŝanĝi kun diversaj esperantistoj futmondaj. Kiu sendos al mi diversajn poŝtmarkojn militajn, ricevos de mi rekompence diversajn neuzitajn kartojn ilustritajn.

S-ro V. Sergejev deziras korespondadon kun fraŭlinoj. Adreso: Estonio, Revalo (Tallinn), Riisenkampfi t. 29-1.

F-ino Ksenja Kurassov deziras korespondadon per poŝtkartoj kaj leteroj. Adreso: Estonio, Revalo (Tallinn), Riisenkampfi t. 29-5.

F-ino Julijno Lampert, Budapeŝt IX, Örmövényg-str. 44a-1V-74, deziras korespondadon kun ĉiuj landoj. Tuj respondos.

S-ro Vilhelmo Balint, Budapeŝt IX, Szigony str. 8 part., deziras korespondadon kun samideoj en ĉiuj landoj. Estimataj gekamaradoj! Kiu volas korespondadi kun hungaraj laboristoj per poŝtkartoj ilustritaj, sendu sian adreson al F-ino Terezio Batta, sekretariino, Budapeŝt X, Gat. utca 31-1-16. Ĉiu ricevos respondon.

Vincenzo Orlando, Sania Fé 77, Bahía Blanca (Argentinio), deziras korespondi kun anoj de ĉiuj landoj.

Antonio Lattanzio, Durraguaira 245, Bahía Blanca (Argent.), deziras korespondi kun ĉiulandaj samideoj.

Isidro Fernandez, Pie. Rocca 67, Bahía Blanca (Argentinio), deziras korespondadon kun samideoj en ĉiuj landoj.

Poŝtmarkojn interŝanĝas A. Villafraña, str. B. de Irigoyen, 1105, Buenos Aires, Argentina Respubliko. — Minimuma sendo 100 malsamaj pm. de sola lando.

## Anoncoj en ET

kostas po kvadrat-centimetro 1 gmk., 0,10 hfl., 0,20 fl., 0,20 n. kr., 2 pencoj, 2 hung. kr., 1 ĉ. kr., 3 pol. mk., ktp. Rabato ĝis 40% ĉe grandaj aŭ ripetataj anoncoj; krome speciala rabato de 20% por niaj abonantoj.

ANONCETOJ kostas: 2-foja enpresio: 3 gmk., 1/2 hfl., 1 fl., 1 ŝil., 6 hung. kr., 3 ĉ. kr., 10 pol. mk. ktp. 5-foja enpresio kostas la duoblon.

## VAPOR-TURBINOJ

sistemo Zoelly,  
por ĉiu potenco.

Fratroj Stork kaj K-io. Hengelo (O). Nederl.

Nur petoj de gravaj firmoj estos respondataj.

## Firmoj

kiuj havas intereson por germanaj komercaĵoj (egale de kia branĉo) kaj kiuj serĉas interrilaton kun germanaj firmoj, sin turnu al

Karl Purfürst, Plauen i. Vogtl.

Schliessfach 154.

Importo. General-Agentejo. Eksporto.

## La Progreso

Ĉeĥoslovaka Organo Esperantista.

Jarabono (10 numeroj) 16 ĉ. kr.

Redakcio: Plzen, Radynska ul. 10.

Redaktata ekskluzive en la lingvo Esperanto.

## La Marto

Oficiala Organo  
de la Ligo de Germanaj Esperanto-Societoj  
en Ĉeĥoslovakio.

Redaktata en bona Esperanto.

Jarabono: 16 ĉ. kr., 13 germ. mk., 40 aŭstr. kr., 40 pol. mk., 20 resp.-kup.

Adreso: La Marto, Haida, Bohemio.

## Abonojn al ET

oni bonvolu pagi per ŝtataj bankbiletoj, per ĉekoj je germanaj bankoj aŭ per resp.-kup. (15 por 10 n-roj). Ni liveros al negermanaj landoj por 20 gmk. 12 n-rojn de ET. Por 10 ŝil., 10 sv. fl., 10 pesetoj, 10 nordaj kronoj aŭ 5 hfl. 50 n-rojn, por 10 fr. fl. aŭ 1 dolaro 25 n-rojn, por 10 italiaj liroj 15 n-rojn, por 10 finnaj mk. 10 n-rojn. — Tuj ĉi prezoj valoras por ĉiuj landoj kun valuto pli alta ol la germana. Al Germanio, la Balkano aŭ la Baltikaj landoj ni liveros 10 n-rojn por 10 gmk., al Ĉeĥoslovakio 15 n-rojn por 20 Kč. Specialajn prezojn por Aŭstrio, Hungario, Polio kaj Estonio oni demandu ĉe niaj respektivaj reprezentantoj.

### Niaj Abonejoj.

AŬSTRIO.

Esp.-Societo por Stirio, Graz, Schönaugasse 6.

BULGARIO.

Georgi Ĥr. Gaŝevski, Centra Librejo „Esperanto“, Bul. Marie Luiza 46, Sofia.

ĈEĤOSLOVAKIO.

Otto Skleněka, Hradec Králové.

Prof. J. Süßner, Saaz 687.

ESTONIO.

Helmi Drezén, sekretario de Est. Esp. Unuiĝo „Espero“, Rütli t. 6, Tallinn.

FINNLANDO.

O/Y. Movado A/B., Kasarminkatu 20, Helsinki.

GERMANIO.

Postschekkonto Köln 708 65, Teo Jung, Horrem Bez. Köln.

HUNGARIO.

Paŭlo Balkanyi, Budapeŝt, Hajos-utca 15, II, 2.

POLIO.

Adolfo Oberrotman, Warszawa, Krak. Przedm. 10.

PORTUGALIO.

Agencia Esperantista, Silva & Carneira, Rua da Assunção 42, 3.